# esperanto aktuala


Revuo de la Esperantista Brusela Grupo Numero 2 / 2014





# Origamio

*Parto 3 : Paperoj kaj formigo*



En la lasta artikolo, ni interesiĝis pri la teĥnikoj, matematikaj, per kiuj eblas obteni la origamian modelon. Ni nun scias, ke de matematika vidpunkto, oni devas faldi la paperon tiel ke oni obtenu iun nombron da pintoj, kaj ĉiu pinto ebligos al ni faldi parton de la modelo (por besto : unu por la kapo, aliaj por la kruroj, kaj tiel plu). Sed eblas ankaŭ krei origamiajn modelojn per alia vojo. Ĉi-foje, anstataŭ konsideri la paperon kiel matematika ŝablono, oni konsideros ĝin kiel skulpta materialo.



Nun, kio pri paperoj ? Se vi kredas ke la plej perfekta papero por origamio estas tiu kiun vi trovas en papervendejoj, sub la nomo «origamia papero», vi eraras ! En realo, malfacilas trovi la taŭgan origamipaperon ĉar tio tute dependas de kion oni volas faldi. Por skulptecaj modeloj, plej taŭgas dika papero. Alikaze, por bestoj, floroj, kaj tiel plu, ekzistas amaso da diversaj paperoj (laŭ teksturo, dikeco, koloro, moleco, faldteno…), kiujn vi povas trovi rete. La plej bona retejo, zorgita de pasiulo, estas http://www.origami-shop.com/

Kaj pri tio, la Vjetnamoj bonegas : Tiu dancisto estas kreaĵo de Giang Dinh. Li estas majstro pri paperformigo, kaj plej impresas la simpleco de liaj modeloj.

Tamen, oni ne povas faldi kiel Giang Dinh per simpla papero. Por fari tion, unue necesas dikan paperon (minimume 100 g/m²) kiu fakte estas samdike kiel la desegnopapero.
Kaj due, oni ofte bezonas apliki teĥnikon, kiu nomiĝas angle «Wet-folding» (humida faldado). Malsekigi la paperon helpas por pli facile formigi la modelon kaj la avantaĝo de tio estas ke poste, ĝi plifortiĝos.



*Giang Dinh*

Do jen du tute malsamaj aliroj. Unu pli science elpensita, la alia pli skulpta : sed ambaŭ, siamaniere, artas.

Estas ankaŭ alia ebleco : memfari paperon. Ne temas pri elfari ĝin, sed ekzemple kunglui du teksaĵpaperojn (tissue paper), eventuale kun aluminio inter ili. La gluo uzita estas la sama kiel tiu por tapetoj. Ekzistas pluraj kombinoj por memfari unikan paperon. Ekzemple, por faldi tiun Orikson (origina kreatoro : Quentin Trollip), mi kombinis teksaĵpaperon kun «Mulberry» papero :




Samy

*Titolaj fotoj : Kato (Giang Dinh), Modulglobo (Garibi Ilan)*

# K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
**Prezidanto** : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
**Sekretario** : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj :** Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
**Eventoj :** JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG : www.esperantobruselo.org**
**Abona membriĝo** : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo :* *www.esperantobruselo.org*

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede** en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono, Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.
Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**
**bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981**

## MARTO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 19a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego : Bernard-Régis Larue** pri Islando |
| **De vendredo la 21a ĝis dimanĉo la 23a** | **ekde 17:00 posttagmeze** | **PEKO 2014 : en Amougies (apud Ronse / Renaix)** **Informoj :** doumontvalere@yahoo.fr +32 (0)485 517 552 |

## APRILO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 2a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego : Neven Kovačić** pri « Interlingvo tra tempo » |
| **Dimanĉo la 13a** | **17:00** | **Sankta meso en Esperanto** en la Resurekta Kapelo strato Van Maelant, 22 - 24 - Etterbeek |
| **Merkredo la 16a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego : Michael CWIK,** „Historio de Esperanto en la Europaj institucioj" |
| **de la 26a de Aprilo ĝis la 3a de Majo** | | **PRINTEMPaS en kastelo Grésillon** Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou (Francio) Intensivaj kursoj kun Radojica Petrović el Serbio, Christophe Chazarein el Okcitanio kaj Ŝtonĉjo el Parizo. **Informoj** pri ĉiaj eventoj en kastelo Grésillon : gresillon.org |
| **Dimanĉo la 27a** | **15:00 - 16:30** | **Prelego en la franca lingvo: Sean O'Rian** pri Esperanto kaj ties tiama uzo en Neŭtrala Moresneto en «La Fonderie» - Strato Ransfort, 27 1080 Bruselo |
| **Merkredo la 30a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego : Angelos TSIRIMOKOS** pri Moderna Greklando |

## MAJO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 14a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego : Bernard-Régis Larue** pri «La malapero de la dinosauroj» |

**Saluton Kara Legantaro !**

Unue, ni deziras danki ĉiujn helpintojn kaj partoprenintojn de nia EBGa Festo, la unuan de Marto. Ĝi estis de la komenco ĝis la fino sukcesege ! Plezure ni spektis koncertetojn de Nikolin kaj Pjotr. Ankaŭ ni renkontis la Verdajn Skoltojn. Ni amuziĝis per iliaj fotoj surekrane kaj anekdotoj pri iliaj (jam) multnombraj renkontiĝoj ! Dank'al Miŝel kaj Andreo, ni amuziĝis ankaŭ per skeĉo... Kaj... la manĝaĵo estis ... miam!.. tre bongusta !!!

Klel kutime, ni prezentos al vi iom da ĉia : recepton, metodon de ĉina kuracado, ktp.. Kaj inter alie, vi legos tuj artikolojn kiuj prezentas la situacion in Kiev el alia angulo. Indas ankaŭ legi surrete la artikolon de «Le *Monde Diplomatique en Esperanto*» far Emmanuel Dreyfus por havi ankoraŭ alian vidpunkton ( http://eo.mondediplo.com/ ).



Ni salutas vin elkore kaj deziras al vi bonan legadon.

*Viaj redaktoroj*
aktuala@esperantobruselo.org

Le Monde diplomatique — en Esperanto - eo.mondediplo.com

# Enhavo


| | |
|---|---|
| Paĝo 2 : | Origamio (parto 3) |
| Paĝo 3 : | Kolofono kaj Agendo |
| Paĝo 4 : | Edito kaj Enhavo |
| Paĝo 5 - 8 : | Ekstremdekstra Ukrainio |
| Paĝo 9 - 11 : | La Retiriĝo |
| Paĝo 12 - 13 : | Junĉjo Metodo |
| Paĝo 14 : | Vojaĝo per biciklo |
| Paĝo 15 : | EBGa Festo |
| Paĝo 16 : | Kvindek-kvin Vortoj, Unu Ekspozicio |
| Paĝo 17 : | Migdala kuko kun oranĝo + Voĉo de la Tempo |
| Paĝo 18 - 19 : | Novjara renkontiĝo 2013- 2014 |
| Paĝo 20 : | PEKO 2014 |

# Ukrainio survoje al la fina venko aŭ "Sieg heil, demokratio!"

**Kiel oni povus nomi homon, kiu ĉiam denove ripetas la saman eraron? Idioto. Sed kiel oni nomu la registarojn, kiujn ĉiam denove subtenas ekstremulojn por poste lukti kontraŭ ili? Mi pensas, ke plej konvena nomo estas – fatrasuloj.**

Ĉiuj faras erarojn, do tio neeviteblas – ĉu por aparta persono, ĉu por registaro aŭ tuta nacio. Nun ĉiuj konas, ke Usono en la 1980-aj jaroj nutris kaj kreskigis Talibanon kaj Al-Kajdon – ja oni bezonis iun forton kontraŭ la soveta armeo en Afganio, pro kio agis laŭ la malnova regulo: "malamiko de mia malamiko estu mia amiko". Do Talibano estis proklamita "batalantaro por libereco" – nobla afero, ĉu ne? Sed kio sekvis? Islamisma teroro en Afganio kaj terora atako de la 11-a septembro 2011. Ĉu Usono lernis tiun historilecionon? Ne.



En 2011 komenciĝis la enlanda milito en Libio. Denove la okcidenta gazetaro glorigis la batalantojn por libereco kaj demokratio. Verŝajne nur post la atako kontraŭ la usona ambasadorejo en Bengazi, dum kiu estis murdita la usona ambasadoro, la okcidentanoj komprenis kiom noblajn kaj raciajn aliancanojn ili akiris.

Ĉu protestoj en la placo Taĥrir estis subtenindaj kaj demokratiaj? Sendube – tuj raportis multegaj okcidentaj amaskomunikiloj. Espereble iomete poste, kiam tiuj noblaj protestantoj seksperfortis eŭropajn ĵurnalistinojn tuj en la placo oni pli ĝuste pritaksis veran vizaĝon de la egipta "libereco".

Mi ne parolu pri la enlanda milito en Sirio, kie bravaj opoziciuloj batalas kontraŭ la krimeca Asad-reĝimo. Tiuj herooj, kiujn kelkaj eŭropaj landoj jam agnoskis sola plenrajta registaro de Sirio, jam montris al la mondo plurajn antaŭsignojn pri kio atendas la landon kaze de ilia venko. Jen ekzemple la vaste konata (vere koninda!) filmeto, en kiu la opoziciulo manĝas koron de murdita soldato. Mmmm, kiom bongusta demokratio... Ĉu vi volas gustumi persone?

Ah, mi forgesis, ke verŝajne plej noblaj kaj subtenindaj homoj de nia tempo estas ĉeĉenaj batalantoj por libereco de sia kara patrujo de la sklaviga rusia subpremo! Kiom da vortoj kaj bruaj plendoj okazis dum la du ĉeĉenaj militoj (la unua kaj la dua) Kiom bedaŭroj pri malvenko de tiuj "herooj" – fortaj montaranoj, kiuj nur volis vivi en sia libera lando.

Bedaŭrinde tiu "libera lando", en kiu inter 1996 kaj 2000 estis eĉ ne unu rusia soldato kaj regis nur venkintaj liberecemuloj, troviĝas tre for de Eŭropo kaj Ameriko, do ties loĝantoj ne povis tutkore ĝui la najbarecon kaj dankemon de la bonkoraj ĉeĉenaj gerilanoj. Nu, ne gravas, vi povas vidi iliajn heroaĵojn en filmetoj, kiuj estis tre multe produktitaj dum la ĉeĉenaj militoj kaj vaste publikigitaj fare de tiu noblaj herooj. Ekzemple jen la plej populara ago de la ĉeĉenaj gerilanoj – ili fortranĉas la kapon de viva rusia militkapito. Kaj kompreneble ĉion atente filmas – ja tio estas ago, pri kiu ili fieregas. En la sama filmo oni povas vidi multajn

similajn scenojn, kompreneblajn eĉ sen koni la rusan. Ĝuu!

En la esperanto-vikipedio mi foje legis en la artikolo pri Ŝamil Basajev, tradukita el la pollingva versio fare de iu naiva (ĉu stulta?) polo la citaĵon, en kiu la fama teroristo, torturisto kaj murdinto fanfaronis pri sia venko en la unua ĉeĉena milito: "Ni venkis tial, ke en niaj animoj malestis timo kaj dubo, estis nur malestimo al rusaj agresoroj. Ni malŝatis tiujn sklavojn, kiuj alvenis nin sklavigi. Nin, kiuj liberecon estimas pli alte ol la vivon. Ni venkis tial, ke varmege ni deziris venki".

Brilege, ĉu ne? Mi nur memorigu, ke la plej fama batalo de tiu krimulo estis la atako kontraŭ la mezlernejo en la kaŭkaza (ne rusa!) urbo Beslano. Tiam liaj subuloj ostaĝigis 1100 homojn, ĉefe infanojn kiuj alvenis por la solena malfermo de lernojaro. Dum kelkaj tagoj ili sidis surplanke sen manĝo kaj akvo en lerneja sporthalo kaj estis liberigitaj nur post la sturmo fare de specnazo. Rezulte de tiu heroaĵo, respondecon pri kiu publike prenis al si Basajev, pereis 334 homoj, el kiuj 186 estis infanoj. Brila sukceso de la ĉeĉenstila demokratio kaj libereco, ĉu ne?



Nun la okcidentaj amaskomunikiloj senĉese raportas pri liberecbatalantoj en Ukrainio. La eŭropaj registaroj minacas al la ukrainia registaro per sankcioj, Usono postulas forigi la milicon de sur ĉefurbaj stratoj. Jen denove ekflamis la nobla koro de okcidenta ordinarulo, kiu tiom ŝatas vidi homojn batali por sia libereco kaj kompreneble por idealoj de demokratio. Ŝajnas ke neniu eĉ por unu momento pensas: "Ĉu tio eblus en mia propra lando?"

Oni diras ke Interreto estas ĉionpova ilo kontraŭ totalismaj reĝimoj, ĉar danke al ĝi homoj povas vidi la veron. Sed la nuna situacio bonege montras eraron de tiu opinio. Homoj vidas nur kion oni montras al ili kaj komprenas nur tion, kio estis al ili dirita.

Ĉu vi volas vidi kio okazas en Ukrainio? Senprobleme, iru ekzemple al Jutubo kaj spektu milojn da priaj filmetoj. Ĉu vi ne komprenas la rusan kaj ukrainan? Tio ne estas problemo, mi helpos vin, kara samideano. Jen nur kelkaj filmetoj, kiujn vi apenaŭ iam vidos en la okcidentaj televidkanaloj.

«Liberec-batalantoj» bruligas homojn. Amuza afero, ĉu ne?

Pacaj batalantoj lerte uzas pafarmilojn.

*( https://www.youtube.com/watch?v=qVgEfJS8YtM )*

Jen ili batas civitanojn *(https://www.youtube.com/watch?v=NFdibJepjHA )*, kiuj alvenis por interparoli kun. Oni diras, ke dum la atako tiuj maskitaj junuloj ĉantadis: "Sieg heil - Rudolf Hess - Hitlerjugend - SS!". Ĉarmuloj, ĉu ne?

Ho, ne pensu ilin aparte kruelaj al senarmaj civitanoj, ili kun ĝojo kaj lerto batas ankaŭ milicanojn *( https://www.youtube.com/watch?v=tB3eWr7TMVE )*. Rigardu kiom brave ili uzas batilojn, armaturojn kaj larmogason *( https://www.youtube.com/watch?v=b-ISyOwQWsY )*. La agresema milico tolereme staras kaj preskaŭ tute ne respondas al tiuj pacaj deklaroj. Evidente malicaj milicanoj tiutempe elkovis iun kovardan planon kontraŭ la demokratio.

Naziaj salutoj ankaŭ ne mirigu vin. Lokanoj scias, ke la gravan kernon de tiuj “liberecemuloj” konsistigas ekstremuloj el Okcidenta Ukrainio. Ili malkaŝe esprimas sian simpation al la ukrainaj naciistoj de la Dua mondmilito, honorigas kunlaborantojn kun la nazioj kaj ŝatas aranĝi torĉoparadojn kun plurgorĝa kriado pri “nacio” kaj “nacia ideo” *( https://www.youtube.com/watch?v=J_DSnm8cIZI ).*



Ĉu tio iomete memorigas al vi la okazintaĵojn de la 1930-aj jaroj en Germanio? Nu, vi estas vere sagaca homoj kaj sendube tiuj demokratemuloj pritaksus tion. Ili ja plurfoje detruis monumentojn al la falintaj sovetaj soldatoj de la Dua mondmilito, aranĝis paradojn memore al la SS-divizo «Galicio» *(NdlR : bv tajpi surrete «14-a Waffen Grenadier Division de la SS (unua ukraino)» )*
kaj fiere montras tra la tuta Kievo portretojn de siaj ideologoj – **Stepan Bandera** *(NdlR: Bv legi surrete en Vikipedio)* kaj **Roman Ŝuĥeviĉ** *(NdlR: Bv legi surrete en Vikipedio)*, kiuj aktive kunlaboris kun la nazioj. Sed sufiĉas da vortoj, rigardu mem kaj ĝuu tiujn marŝojn kaj bildojn *( https://www.youtube.com/watch?v=KYnYyDpmQGg ).*
Mi nur klarigu, ke rusparolantaj homoj en la unuaj kadreroj estas ukrainaj judoj, unu el kiuj (sinagoga instruisto) estis batita surstrate kaj nun troviĝas en malsanulejo. Mi pensas, ke vi sentraduke komprenos kion ili volas esprimi – kompreneble la ardan subtenon al la liberecbatalo. Batalu ĝis la fino. Ĉu post fina venko sekvos la fina solvo? La vivo montros.

P.S. Ĝis nun mi trovis nur unu esperanto-raporton *(NdlR: bv legi ĉi sube)*, kiu pritraktas la situacion en Ukrainio aliflanke ol plejparto de la okcidentaj amaskomunikiloj. La Majstro donis al ni la lingvon por ke ni komprenu unu la alian, parolu inter si rekte kaj senpere, sen pagitaj mensoguloj kaj sinceraj idiotoj el registaroj kaj televido. Sed esperantistoj plejparte limigas sian lingvouzon al senĉesa kaj stulta kreado de verdaj bildetoj “Vivu Esperanto!” kaj ties publikigo ĉe Fejsbuko. Ĉu ni meritas tiun donacon?
PPS. Dum mi redaktis tiun blogaĵon aperis la oficiala informo de la Ministerio pri sano de Ukrainio: ekde la 18-a de februaro dum la "pacaj protestoj" en Kievo pereis 67 homoj. Dum nur unu tago, la 20-an de februaro estis murditaj 10 policanoj.

Stanislavo -24/02/2014

http://www.ipernity.com/blog/stanislavo-belov/709433



## Ukrainio: la rolo de ekstremdekstro en la ribelo

*(...)*

*Laŭ observantoj, la membroj de Praviy sektor* (NdlR : kiun oni povas traduki per «dekstra sektoro) *ne estas plimultaj sur la placo de Sendependenco, sur kiu koncentriĝas la kontestado en Kievo. Sed la stilo de ties membroj estas malfacile komparebla kun por-Eŭropa movado. Ekzemple, tiu viro kiu, antaŭ ol alfronti la policon, fabrikis ligno-ŝildon sur kiu li desegnis keltan krucon kaj skribis la ciferojn 14 kaj 88. La kelta kruco estis delonge alprenita kiel ekstremdekstra simbolo. La cifero 14 siaflanke referencas al la « dekvar vortoj», simbola frazo alvokanta unuiĝon de Blankuloj, kaj 88 al ambaŭ « h » de « heil Hitler ». Eĉ pli videblaj, ĉieestantaj sur la placo, la ruĝaj kaj nigraj flagoj, kiuj tute ne rilatas kun anarko-sindikatismo, sed estas koloroj de la Kongreso de ukrainiaj Naciistoj*



Eĉ la partio **Svoboda**, je dubinda reputacio kaj plene engaĝiĝinta en la kontraŭregistara lukto, estas juĝata kiel « tro malvigla » de la homoj de *Praviy sektor*, laŭ la konfeso de unu el ties estroj. « Ili estas ĉiuaĝaj homoj, ĉu rusparolantoj, ĉu ukrainparolantoj, kiuj venas de ĉiuj regionoj de Ukrainio, Oriente aŭ Okcidente, kaj kiuj sin deklaras naciistoj. Multaj estas aliĝintaj al ekstremdekstro, sed ne al la naciisma partio *Svoboda*, kiun ili trovas tro malvigla ».

*Praviy sektor* aliiĝas al neniu specifa politika partio kaj ne havas aliĝintojn. Ĝi estas memstara movado. Unu el ties membroj eksplikas ke la strukturo de la grupo konsistas el naciismaj futbal-fanatikuloj. Ties aktivuloj, male al la aliaj manifestaciantoj, ne deziras proksimiĝi de Eŭropa Unio, kiun ili juĝas kiel « premanto de la nacioj ». Kion ili deziras? Naciisman revolucion. « Pravyi sektor » estas naciisma organizaĵo kiu vigle partoprenas la revolucion, eksplikas alia el ties membro. Ni opinias ke tiu reganta reĝimo estas okupacia reĝimo, tial niluktas por instalado de naciisma registaro, libera kaj naciisma registaro, sen la reganta mafio.

*Praviy sektor* prenas sur si rolon en la uzado de perforto. Ofte kapuĉitaj, protektitaj per kasko, kubutprotektaĵoj, genuingoj, ĝiaj partizanoj ne alfrontas la policistojn per nudaj manoj : kelkaj havas bastonojn, aliaj basbalklabojn. Aliaj eĉ konstruis katapulton, veran mezepokan ĵetmaŝinon uzitan kontraŭ la policistoj.



La ukrainiaj aŭtoritatoj denuncas la ĉeeston de tiuj radikalaj naciistoj en la vicoj de la opozicio. La Ministerio pri Internaj Aferoj taksas ke almenaŭ 500 simpatiantoj de *Praviy sektor* vivas en la publikaj konstruaĵoj en la centro de Kievo okupata de la manifestaciantoj.

http://www.lefigaro.fr/international/2014/01/28/01003-20140128ARTFIG00369-le-role-de-l-extreme-droite-dans-la-revolte-ukrainienne.php

24/01/2014 - neniammilitointerni.over-blog.com

# La Retiriĝo (La Retirada)




La franca registaro estas hezitema kaj troŝparema en la helpo de la ekzilitoj, vidante kun teruro elĵetiĝantajn hordojn de malfeliĉaj "ruĝuloj".



*Priserĉado ĉe la landlimo fare de francaj soldatoj*



*Deponitaj armiloj ĉe la landlimo (Le Perthus) -februaro 1939*



*Hispanaj batalantoj enirante francion en februaro 1939*



*Sen fina vico de senarmigitaj hispanaj batalantoj post transiro de la franca limo en Bourg-Madam februaro 1939*



*Hispanaj batalantoj alvenantaj en Le Perthus februaro 1939*

Ambigue, kaj por kontroli ĉiujn eblecojn la franca registaro faras interkonsenton kun la naciistoj nomatan "Accords Bérard - Jordana" (la 25an de februaro 1939).

En Burgos, Senatano Bérard intertraktis la starigon de la diplomatiaj rilatoj inter Francio kaj la frankista registaro, kun Generalo Jordana. Antaŭa interkonsento pri la agnosko de la naciista registaro kaj la restituado de la respublikaj ŝipoj rifuĝintaj en la francaj maraj akvoj kaj de la trezoroj artaj kaj la mono kiu troviĝas en Francio en la kofroj de la Franca Banko en Mont-De-Marsan.



*Alveno de "Internaciaj Brigadistoj" en la plaĝo de Argeles*

La interkonsento ankaŭ kondiĉas ke ambaŭ landoj klopodos certigi pacon kaj sekurecon unu al la alia, kio influos en la revenon (devigitan aŭ libervolan ) de respublikanaj ekzilitoj, kiuj estos uzataj por "rekonstrui " Hispanion.

Tiuj interkonsentoj subskribas la finon de la Hispana Respubliko, kaj tio antaŭ ol la lastaj urboj estis venkitaj. Ili ankaŭ estos ofte uzataj de la faŝisma reĝimo por kapti politikajn respondeculojn kiuj estos eliminataj (Companys, Zugazagoita, Peiró, Mera...). Dum longa tempo, estos la solaj interkonsentoj regantaj la rilatojn inter la du landoj (ĝis la 50aj jaroj).

Philippe Petain estis nomumita ambasadoro de Francio en Burgos la 2an de marto, 1939.
Iĝas klare ke la ĉeesto en la franca teritorio de la hispanaj viroj, virinoj kaj infanoj levas oponojn kaj ondojn da subtenoj kies cefa respondeculo estas la gazetaro.

Polemiko kiu situas tute en rekta linio al kio eksplodis tri jarojn antaŭe, kiam ekde julio 1936 stariĝis la demando pri la franca registara helpo al la respublika hispanio atakita de la perfidaj generaloj.

La gazetaro favora al la maldekstrularo subtenis tiujn batalantojn por la libereco, dum eldonaĵoj proksimaj de la ekstremdekstrularo - kaj ili estis multaj - trahakas ilin per vortoj kiuj nuntempe igus ilin kontraŭleĝaj.

Inter tiuj du movadoj, kelkaj regionaj amaskomunikiloj, ĝenerale konsiderataj kiel pli moderaj, hezitas situiĝi, sed finfine ili iĝas kontraŭ la rifuĝintoj. Ĉi tiu alfrontiĝo, kiu kelkfoje prenas la formon de larvita intelekta civila milito, antaŭmontras la fosaĵon kiu, jaron poste, aperos en la franca politiko. La hispana dramo estis la rivelilo de la veraj politikaj kaj sociaj celoj de la momento.




*Alveno de hispanaj batalantoj ĉe la strando de Argeles (Februaro 1939)*




Tuj je la alveno ĉe la landlimpasejo, familioj estas disigitaj.

La francaj aŭtoritatoj malfermis koncentrejojn sur strandoj, en Argelès, Saint Cyprien, Barcares, Agde, sed ankaŭ disciplinajn koncentrejojn en Vernet d' Ariège, Gurs, Bram, la fortikaĵo de Collioure ... sed ankaŭ en Norda Afriko, Tunizio: La Guettat, Gafsa, Gafsa Gare2 kaj Alĝerio: Relizane, Bou - Arfa, koncentrejo Morand Setat, Oued Akrouch, Tandara, Ain -el- Ourak, Meridja, Djelfa, minejoj de Kenadza, aŭ la terura Caffarelli-malliberejo, sed, pli grave, la disciplina koncentrejo Hadjerat M'Guil en Suda Alĝerio, kie malliberuloj estis senditaj kiam ili ribelis.




Fine de la milito, la respondeculoj de tiu lasta koncentrejo estis juĝitaj kaj ekzekutitaj kiel torturistoj kiuj praktikis metodojn kiel en naziaj koncentrejoj.



*Alveno de hispanaj batalantoj ĉe la strando de Argeles (Februaro 1939)*



*Hispanaj rifiĝintoj en la plaĝo de Argeles*

*Floreal Martorell*
*(daŭrigota)*

# La Junĉjo-metodo por natura orienta kuracado

Lastan novembron en Zaozhuang mi partoprenis la 10-an Ĉinan Esperanto-Kongreson, kiun ĉeestis multaj samideanoj el la tuta Ĉinio kaj el najbaraj landoj. Ĝi estis festa okazo neforgesebla precipe ĉar mi konatiĝis kun e-istoj simpatiaj kaj interesaj, unu el ili estas aparte menciinda, temas pri Junĉjo el Koreio.

Junĉjo naskiĝis apud la monto JIRI Chon-buk en la jaro 1968. Li studis elektronikon en universitato. Nun, ekde 2008, li laboras en sia seula oficejo "Orienta Naturkuraca Instituto". Esperanton li eklernis en 1987 en urbo Chonju kune kun kelkaj aliaj lernantoj.

Li ellaboris naturan metodon por kuracado kaj jen klarigas al ni pri kio ĝi temas.

Kial vi esperantistiĝis?

Tiam miaj ŝatokupoj estis radio, pasporta servo, skolto, fotado ktp. Tiutempe mi havis problemojn pri radio-kontaktoj kun azianoj pro la lingvaj baroj. Ni azianoj uzis la anglan lingvon mallerte en la etero. Tial ni havis malfacilaĵojn por bone interkomunikiĝi. Kaj mi sentis bezonon pri io, kio povus plifaciligi la interkomunikadon inter ni azianoj. Ĝuste tiam mi trovis la afiŝon sur la strato por la civitana Esperanto kurso de Korea Esperanto-Asocio. Kaj mi rekte iris al la lernejo kun granda intereso. Ekde tiam mi eklernis Esperanton kontentite pro la diversaj avantaĝoj, kiujn ĝi oferas. Fakte tiam Esperanto estis mistera mondo por mi.




Junĉjo ĉe la labortablo en sia Instituto

Kiam, kiel vi komencis interesiĝi pri alternativaj rimedoj, laŭnature, por kuracado?

Mi eklaboris en Orienta Medicina Hospitalo ekde 2002. La hospitalo kuracis diversajn haŭtmalsanojn. Tiutempe foje mia fratino suferis pro serioza konstipo. Fine ŝi ricevis operacion por forpreni ŝian grandan inteston. Tiam ni familianoj estis ŝokitaj pro la terura rezulto kaj mi konsciis pri la limoj de la moderna medicino. Tiu ĉi evento estis komenca motivo por mi rilate la naturan kuracistan vojon.





Ĉu viaj spertoj en Esperantujo influis viajn profesiajn elektojn?

Kompreneble. Mi povis vojaĝi tra la tuta mondo pere de Esperanto pli komforte kaj pli efike. Mi povis introspekti min mem pere de vojaĝoj en Esperantujo. Kaj poste tiu ĉi vojaĝado influis mian vivon kaj ankaŭ mian profesian elekton. Mi povis larĝigi mian pensmanieron dank' al EO internaciaj renkontiĝoj. Ĉi tiuj spertoj ŝanĝis mian vivon, mi iĝis pli kaj pli saĝa.

Kiel vi fariĝis natura kuracisto?

Mi komencis naturan kuracon pro familia malsano. Mi studis en diversaj lernejoj malsamajn metodojn. Mi daŭre sekvis kursojn rilate akupunkturon kaj studis abelan akupunkturon, nervan kuracon, mensan energian kuracon, diversajn terapiojn mi ellernis. Nuntempe mi interesiĝas pri la diversaj kuracaj teorioj. Ni povus ekscii interesan regularon se ni perceptus nian korpon laŭ la orienta medicina teorio. Fine ni scios, ke nia korpo estas parto de la naturo kaj ĝi forte estas influita ekde kiam ni naskiĝis de naturo kaj klimato.

Kiom da tempo vi bezonis por atingi konkretajn rezultojn?

Ĉu ekzistas konkretaj rezultoj sur la medicina kampo? Ĉar ĉiam ĉe la rezulta tempo nova io aperis antaŭ mi por komenci nove. Ŝajne ni povas vidi pli multe kaj longe sur la pinto de monto ol sur la strato. Sed tamen, jam pasis 10 jaroj post mia unua paŝo en medicinan kampon.






La haketitaj kuracaj grenoj

Kio estas la kurac-rimedo per krudaj grenoj de vi prilaborita?

La kurac-rimedo celas ekvilibri la du sangotubojn, kiuj direktas al la granda cerbeto. La granda cerbeto estas tre grava parto en nia korpo, kiu laboras rilate la tutan korpan sangocirkuladon, kontrolas hormonojn, aŭtomatan nervan sistemon, influas al imunecaro kaj enzimoj, pensado kaj decidado, memorado, agado kaj kontrolado de funkcioj de internaj organoj de nia korpo ktp. Do, nia korpa malsano signifas, ke la granda cerbeto havas problemon. Ĉikaze, la sangofluado al granda cerbeto ne estas ekvilibrita. Tiun ĉi malekvilibriĝon ni povas analizi per pulso-analizo kaj ni povas kontroli internajn organojn laŭ la orienta medicina teorio kun ok grenoj krudaj. La vivantaj grenoj krudaj havas fortan naturan energion. Per tiu ĉi energio nia korpo ekvilibriĝas. La ok grenoj krudaj havas siajn proprajn karakterojn fortajn. Tiu ĉi rakonto estas sur la orientaj medicinaj teorioj t.e. kvin elementaj regularoj.

Kiaj pacientoj resaniĝis pere de via metodo?


*(daŭrigota)*


# Vojaĝo per bicikIo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'









## Montenegro

(29/4 -> 02/5/2009 - 174 km => 3626 km)

▷ Kiam ni alvenas je la montenegra landlimo, doganisto sidanta en sia budeto ne direktigas la okulojn al ni kaj mekanike postulas la aŭtajn paperojn antaŭ ol kliniĝi eksteren kaj konstati kun amuzo, ke ni vojaĝas bicikle.

En Montenegro ni vidas neniun bicikliston, escepte de Sebastian, iu germano renkontitan tri sinsekvajn tagojn. Tiu lando ne havas biciklan kulturon. Cirilo havas problemon pri pedaloj kaj pribiciklan vendejon iom komplikas. Iuj direktigas nin al riparisto en Kotor, sed en la vendejo aĉeteblas nur kelkaj bazaj bicikloj kaj precipe motorkultiviloj... Ni profitas la okazon por viziti la malnovan urbeton, iun el la plej agrablaj de la lando, ne tro plena je turistoj.

Ni poste direktiĝas al Bar. Denove, neniu kapablas indiki al ni, ĉu tie troveblas bicikloriparisto. Ni hazarde pasas antaŭ la sola vendejo de la urbo, plie kun detalaj pecoj. Eĉ la unua de majo ne igis ĝin fermiĝi...
Cirilo finfine povos ŝanĝi sian difektiĝintan pedalon post longa kaj senesperiga provo komprenigi al la vendisto, kiuj pedaloj interesas lin.
Sed por li, ne ĉesis la problemoj... Roz' koleras, ĉar de jam tri tagoj ni preskaŭ ne plu moviĝas. Malfruas niaj ekiroj, multas la haltoj, ni sekve ne biciklas pli ol 30 km tage anstataŭ niaj kutimaj 80.

Tamen ja dum ni sidas sur la centra placo de Bar por pridiskuti la problemon iu viro alparolas nin, eĉ rekte en Esperanto. Li proponas gastigi nin en sia hejmo, 8 km for laŭ nia itinero, tio bonvenas! Post kiam ni duŝiĝis, li invitas nin al loka manĝejo por malkovri la montenegran nacian pladon, ĉorbon. Foje utilas scipovi malŝpari tempon por ŝparii ĝin...

*(daŭrigota)*







**EBGa FESTO**

Mirinda festejo, manĝaĵo, kaj etoso per ĝojegaj partoprenantoj !
**Sukcesege !**






# Kvindek-kvin Vortoj, Unu Ekspozicio

**Esperanto-Kultur-Centro** de Tuluzo (Francio) kreis fotokolekton, kies celo estas konkrete bildigi la vivantecon kaj buntecon de Esperanto.

Ĉiu esperantisto klopodanta klarigi, kio estas Esperanto, frontas al tiu problemo: kiel konsciigi pri la realeco de nia lingvo? Kiel konkrete montri, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj buntas? Ni parolas pri facileco de la gramatiko, pri milionoj da parolantoj, pri internaciaj renkontiĝoj, ktp... sed por la aŭskultantoj tio ofte restas en la kampo de teorio.




La argumentoj ja povas impresi la intelekton, sed gravas ankaŭ impresi la imagon. Tiucele ekestis la ideo de la fotokolekto *"Mia vorto..."*, kiu celas bildigi la vivantecon de Esperanto.




Tiu fotokolekto estis realigita en julio 2013 en Slovakio, okaze de Somera Esperanto-Studado (SES). (...)

En 2013, SES logis 230 ĉeestantojn el 27 landoj. Kvarono el ili akceptis partopreni la projekton de la fotokolekto *"Mia vorto..."*. Ni invitis ilin libere elekti vorton en Esperanto.




Tiu povis esti vorto, kiu al ili ŝajnas grava, simbolas Esperanton, aŭ tute simple plaĉas.




Skribinte ĝin sur paperfolio, ili estis fotitaj kun ĝi.

Rezultis 55 bildoj – jen amuzaj, jen seriozaj, jen poeziaj. Kion ili prezentas? Vizaĝojn de diversaj homoj el diversaj landoj, ligitajn per unu sama lingvo. Tiel, la fotokolekto *"Mia vorto..."* implice diras multon pri Esperanto kaj ties parolantoj. Montrante homojn, kiuj elektis proprajn vortojn, ĝi diras ke homoj parolas Esperanton, ĝin ŝatas kaj alpropigis al si.




Montrante homojn en sama kunteksto ĝi diras, ke ĝi estas uzata en internaciaj renkontiĝoj.

Montrante ĉefe junulojn, ĝi kontraŭdiras la kutiman bildon, kiun trenas kun si Esperanto (nur hobia lingvo de emeritoj). Fine, la elektitaj vortoj spegulas la diversecon de la personecoj de la fotitoj – kaj kelkfoje rekte aludas motivon lerni Esperanton.

La tuta kolekto *"Mia vorto..."* jam spekteblas en la fotogalerio de la ttt-ejo http://www.esperanto-midipyrenees.org kaj en la facebook-paĝo de EKC. El tiu materialo la asocio EKC kreos ekspozicion, kiu utilos ekzemple por riĉigi informo-budojn dum publikaj eventoj.

Gravas fini dankante ĉiujn fotitojn, kiuj malimplice donis la permeson uzadi iliajn fotojn por Esperanto-varbado. EKC pretas disponigi la originalajn fotojn al ĉiuj-asocioj, kiuj tion petos.

*Christophe Chazarein*

# Migdala kuko kun oranĝo

Laŭ Michel STASSIN (EBGano)



## Ingrediencoj

1 oranĝo
120 gr da migdalopulvoro
3 ovoj
80 gr. da sukero

## Preparado


•En ujo, miksu la sukon de oranĝo, la migdajojn, la ovoflavaĵojn (konservu aparte la ovoblankaĵojn), kaj sukeron

•Kirlu firme la ovoblankaĵojn kaj aldonu ilin delikate al la pasto.

•Verŝu la miksaĵon en antaŭe ŝmiritan kukomuldilon kaj baku je 160°C dum ĉirkaŭ 40 minutoj.

•Kontrolu la kuiradon per pinta tranĉilo (ĝi devas eliri puran).

# Eduardo Galeano «Voĉo de la Tempo»




**Fabrikoj**

Ni estis en la jaro 1964 kaj la hidro de internacia komunismo malfermegis siajn sep faŭkojn por forvori Ĉilion.

La publika opinio estis bombata de bildoj de brulantaj preĝejoj, de koncentrejoj, de rusaj tankoj, de la berlina muro meze de Santjago kaj de plenbarbaj gerilanoj kiuj forkonduis infanojn.

Okazis elektoj.

La timo triumfis, kaj Salvador Allende estis venkita. Dum tiuj doloraj momentoj mi demandis lin, kio pleje vundis lin.

Allende rakontis al mi, kio okazis ĝuste apude, en domo de la kvartalo *Providencia*. Virino kiu laboregis kiel kuiristino, dommastrino kaj vartistino interŝanĝe kun magra salajro, estis metinta ĉiujn siajn vestaĵojn en plastan sakon kiun ŝi enterigis en la ĝardeno de siaj mastroj por ke la malamikoj de la privata proprieto ne forprenu ilin.

# Novjara Renkontiĝo 2013 - 14

Vintraj ferioj estas tre bona periodo por esperantistoj. Du renkontiĝoj tiam okazas : JES (Junulara Esperanta Semajno), kreita por junuloj, kaj NR (Novjara renkontiĝo), kiu celas homojn de ĉiu aĝo. Ambaŭ ege bone funkcias : po inter 180 kaj 200 homoj aliĝis en ambaŭ renkontiĝoj. Jen eta raporto de NR, kiu laŭ mi estas unu el la plej sukcesitaj Esperantaj aranĝoj.

Unu el la kvalitoj de NR estas ke la programo neniam malplenas. Okazis diversaj manlaboraj atelieroj, diversaj prelegoj, kursoj por komencantoj, ĵonglado ateliero, triktrako turniro, tradukateliero, piĵamaj rakontoj por infanoj, kvarvoĉa ĥoro kaj muzikateliero, trikado, budisma meditado por fruvekiĝuloj, luphoma ludo por malfruvekiĝuloj…



La temo de tiu NR estis «Magio». Christoph Frank (supra bildo) proponis ludposttagmezon por infanoj ekde 6 jaroj, «La sorĉista konkurso».







Kaj kompreneble, ĉar ĝi nomiĝas «Novjara renkontiĝo», ankaŭ okazas Silvestra festo, per speciala bufedo, dancejo, fajraĵoj, kaj bonhumoro.



*Klaus, kiu zorgis pri la ĵonglada ateliero, ankaŭ fajron kraĉis kaj ĵonglis per fajro dum la silvestra nokto.*



*Sed mi, kiel perfekta ne-sociala homo, pasigis miajn unajn momentojn de 2014 kun Rachmaninoff ! :D*



**Ni dancis kune la tutan nokton...**

NR finiĝis per du mirindaj vesperoj : Unue, la «muzika vespero», en kiu vi povintus spekti kuniĝon de harpo kaj fluto, kvarmanajn piano-pecojn, kvarvoĉan ĥoron, improvizadon de piano kaj harpo, kaj gitarkoncerton de Pjotr. Due, la «adiaŭa vespero» kiu montris interalie la rezulton de la improviza teatro-ateliero, magiaj trukoj, kaj tiel plu.



Mi povus ankoraŭ longe paroli pri la mirindaj momentoj kiujn mi pasigis tie. La koncerto de Kajto, la senfinaj ludoj de Tabloteniso, la tabloludoj, la vesperaj diskutoj, kaj tiel plu… sed unu afero plej gravas : Venu al la venonta NR ! Kaj tiam vi povos malkovri la specialan alkemion de tiu renkontiĝo.

*Samy*

Printempa Esperanto KunvenO

Ĉu
vi PEKOs ???
Ah, ah ah !!!



PEKO

2014

KIE ? Centre Protestant - Verte Voie, 16 - B 7750 Amougies

Kiam ? Ekde vendredo la 21a (17a h) ĝis dimanĉo la 23a de Marto

Pli da informoj surrete : www.esperanto-wallonie.be
aŭ ĉe Valer : doumontvalere@yahoo.fr
+32 (0) 485 517 552

Laŭdire okazos Peko ĉi-tie





